# TEJO tutmonde!

numero 2.1983

marto - aprilo 1983




desegnis: Georgo Kamaĉo

tutmonda esperantista junulara organizo

## Kiam vi ricevos ...

ĉi tiun revuon jam la plej vintraj monatoj estos pasintaj kaj oni povus nomi ĉi tiun numeron la printempan - se oni estas nordhemisferano.

Nia titolpaĝa birdeto ankaŭ estas nordhemisferano - kiel la redaktoro -, en Hispanio elkoviĝis kaj printempe debutas. Kvankam TEJO Tutmonde! ne debutas ĝi ja nur duafojas kaj ni esperas ke ĝi ekde nun vere burĝonos.

La kalendaro ĉi-foje estas konsiderinde pli ampleksa ol tiu de la unua numero, i.a. dank' al la Turisma Esperanto Kalendaro 1983 de Monda Turismo/Esperantotur (Turisma Servo de TEJO sed ne de UEA); tamen ĝi limiĝas al la eventoj de la venontaj kvar monatoj ĉar alikaze ĝi okupus pli ol justan proporcion de la revuo - sed estas pli bone informi la redakcion tro frue ol tro malfrue aŭ entute ne; se via renkontiĝo celas allogi junulojn (inkluzive infanojn) kaj ni scios pri ĝi ĝustatempe ĝi aperos siatempe en la kalendaro de TEJO Tutmonde!.

Sed ne nur informoj por la kalendaro estas sendendaj. La redakcio ne nur bonvenigas sed deziras raportojn pri via agado (projektoj, renkontiĝoj, ktp.) kaj ideoj, precipe se ili alvenas antaŭ la redakcia limdato, kiu estas la 15-a de ĉiu malpara monato. Do, se vi volas verki reagan artikolon al io en ĉi tiu numero kiu aperu en TEJO Tutmonde! n-ro 3 vi devas TUJ ekverki! - la iom malfrua apero de ĉi tiu numero ŝuldiĝas ĝuste al la manko de sufiĉaj artikoloj ĝis antaŭnelonge.

Laste, bv. atenti ke la redaktoro (samtempe estrarano pri landa agado de TEJO) havas novan adreson, kiu estas:

Paŭlo S. Hopkins
111 - 157 University Ave. W.
Waterloo
Ontario

Kanado   N2L 3E5

## Survoje al IJJ

Jam la Kebekia* junularo preparis sin por la Internacia Junulara Jaro (IJJ) en 1985. Okazis komence de decembro en Montrealo grava renkontiĝo kiu nomiĝis I.M.A.J. (sonas kiel "image" kio signifas "bildo"n) kaj kies temo estis "Foje, la junularo". Cent junularorganizoj estis invititaj reprezentiĝi per po du reprezentantoj en la semajnfina kunveno. Alvenis 224 gejunuloj el diversaj devenoj, medioj kaj socitavoloj. Estis reprezentitaj lokaj junuldomoj, studentaj asocioj, medioj junulkluboj, skoltoj, senlaboruloj, laboristoj ... kaj ankaŭ Junularo Esperantista Kanada (JEK). Mi do, kiel vicprezidanto de JEK reprezentis ĝin dum tiu tuta semajnfino diskutante kun aliaj gejunuloj pri la situacio de la junularo, la nunaj problemoj kaj aliaj eblaj solvoj. Mi havis ankaŭ la okazon prezenti i.a. TEJOn kaj la Pasportan Servon de TEJO. Estis granda intereso flanke de la aŭskultantoj kaj estiĝis kunlaboraj rilatoj inter JEK kaj la organizantoj de la renkontiĝo. Ekzemplo de konkreta rezulto estas la aperado de artikoloj pri la Esperanto-movado en junulara gazeto kiun oni eldonas en ses mil ekzempleroj.

Ĉu ankaŭ ĉe vi oni preparas por la IJJ? Tuj esploru pri tio kio okazas tiurilate vialande!

Normand Fleury, Kanado


* (noto de la redaktoro)
Kun sesmiliona enloĝantaro la provinco Kebekio entenas pli ol kvaronon de la Kanada enloĝantaro. Pro tio, kaj pro tio ke 80 % de la 6,5 milionoj da franckanadoj - kaj la franca kaj la angla estas la du oficialaj lingvoj de Kanado - loĝas en Kebekio, evoluoj en Kebekio havas grandan efikon sur la Kanada socio kiel tuto.

# 1985: internacia junulara jaro

## Komitati nekriplite

Komitatanoj antaú kelkaj tagoj ricevis por poŝta voĉdono sufiĉe komplikan proponon pri areto da modifoj je la Komitata Regularo. Per tiu ĉi artikolo mi esperas klarigi la celon de tiu propono. Temas pri la kvorumo de komitatkunveno. Laú la Regularo, kunvena decido estas valida nur kiam ĝin partoprenas pli ol duono de ĉiuj komitatanoj.

Ni imagu sufiĉe realisman situacion laú la nuna Regularo. Estas jaro en kiu la Komitato havas 50 anojn. 28 el ili ĉeestas la IJK-n, sed ili ne ĉiuj estas diligentaj pri ĉeesto en komitataj sesioj. Tamen, por ke iu decido estu valida minimume 26 (pli ol 50 : 2) devas partopreni validan voĉdonon, tio estas, levi la manon pore, kontraúe aú sindetene. Tiuj, kiuj ĉeestas la IJK-n



sed ne la sesion, aŭ kiuj ĉeestas la sesion kaj ne levas la manon, ne estas nombrataj.* Se manpleno da komitatanoj mankas je iu punkto, voĉdono pri diskutita demando devas esti lasita ĝis 26 ĉeestas, aŭ metita al poŝta voĉdono.

Se 26 jes ĉeestas, kiom da devas voĉdoni pore, ke la propono estus akceptita? Nu, se 14 (pli ol duono) sindetenas, oni tion konsideras ne voĉdoni pri la demando; do minimume 13 devas voĉdoni aŭ por aŭ kontraŭ. El tiuj 13, minimume 7 devas esti por, ĉar alie la kontraŭuloj venkas. Kompreneble, kontraŭuloj povas komploti strategie sindetenante, kaj tiam nepras ke estu 13 poruloj.

Nun imagu la situacion laŭ la proponataj modifoj. Imagu denove ke el 50 komitatanoj 28 partoprenas la IJK-n. Tiuj 28 anoncas sin komence de la kongreso al la protokolanto, per subskribo de listo. Post tiu subskribo ili estas konsiderataj partoprenantoj de ĉiuj decidoj - do, respondecaj pri la laboro de la Komitato. Tamen, ĉiu, kiu levas manon nek por nek kontraŭ iu propono, laŭdifine sindetenas. Ne necesas nombri la sindetenantojn, ĉar oni povas kalkuli kiom ili estas. Ili eĉ ne devas ĉeesti. Tamen, se pli ol duono de la 28 sindetenas, oni konsideras tion decido ne voĉdoni pri la demando. Do, por ke estu certe ke io akceptiĝos, devas esti minimume 14 poruloj.

Sekve, se la propono akceptiĝus, malkiel nun, foresto de manpleno da komitatanoj ne bremsus la laboron; tamen, samkiel nun, neniu eta minoritato povus fari malican decidon dum la aliaj forestas.

Ian Tarrant
ano de KSR.

* Kompreneble, ĉiuj komitatanoj havas respondecon ĉeesti kaj voĉdoni en ĉiuj sesioj, sed praktike montriĝis, ekzemple en Leuven, ke pro diversaj kialoj, ne ĉiuj sukcesas plenumi tiun respondecon.

---

## KONGRESOJ

### Debrecen - IJK 1983

Kiel vi povis legi en Esperanto 82/12 kaj Koncize 82/6, dum longa tempo - pro nealvenintaj dokumentoj - la Estraro de TEJO ne povis definitivigi decidon pri la IJK en 1983. Sed nun la decido estas farita: la Internacia Junulara Kongreso de TEJO en 1983 okazos en Debrecen, Hungario inter la 23a kaj 30a de julio

1983. La kotizoj varios inter 210 kaj 410 nederlandaj guldenoj (laŭ aĝkategorio kaj aliĝdato) kaj malpli aŭ pli luksaj ĉambroj estas haveblaj kun rabatoj resp. krompagoj. Aliĝiloj aperas sur paĝoj 7 kaj 8 ĉi-sekve. Ju pli frue vi aliĝas, des malpli multe vi devas pagi.

Postkongreso por la IJK estos, kompreneble, la Universala Kongreso en Budapest (de la 1-a ĝis 7-a de aŭgusto) kie oni planas tre favorajn aliĝkondiĉojn por partoprenintoj de la IJK - vidu la periodaĵon Esperanto por pliaj detaloj.

Ĉijare estos ankaŭ antaŭkongreso: Internacia Junulara Tendaro. La kotizo de Ft 1000 inkluzivas programojn, manĝadon kaj loĝadon en kvarlitaj tendoj. La IJT okazos de la 16a ĝis 23a de julio apud la lago Velence (H) inter Budapest kaj Balatonlago.

Por fervoruloj estas ankaŭ ebleco havi antaŭantaŭkongreson al la IJK: la 5a Centra Internacia Esperanto-Laborbrigado. Ĉi tiu mediprotekta laborbrigado okazos inter la 1a kaj 16a de julio en Szentendre (H). Partoprenantoj de la CIEL havos specialan rabaton por partopreni la IJT.

Informoj pri IJT kaj CIEL haveblas de: Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 193, H-1368 Budapest 5, Hungario.

## Kaj por tiuj kiuj biciklemas ...

Biciklista Esperanto-Movado Internacia (BEMI) planas kunordigi individuojn formante karavanojn. Eventuale estos pluraj karavanoj, ĉar ne ĉiuj volas veni samtempe, kaj krome, el almenaŭ du diversaj direktoj. Ĉe la hungara landlimo verŝajne aliĝos al la grupoj hungaraj biciklemuloj.

Por ricevi pliajn informojn pri la karavano el la okcidento (foriro de Passau/FRG: 11a de julio) anoncu vin ĉe: Thomas Bormann, Koppel 94, D-2000 Hamburg 1; alvenontoj el GDR, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio ĉe: Marie Vančurová, Palackého 153, CS-28903 Městec Králové; kaj aliaj ĉe: Sándor Hideg, p.a. HEJ, Pf. 193, H 1368 Budapest.

## Swanwick - IJK 1984

Kiom malrapidis la progreso en la organizado de la 39a IJK tiom rapidas la LKK de la 40a IJK de 1984. Responde al la alvoko de la Komitato rezulte de la konflikto inter la planitaj datoj de la IJK kaj UK en 1984 la LKK de IJK-Swanwick sukcese provis ŝanĝi siajn datojn, por ke junuloj povu partopreni kaj la IJK-on kaj la UK-on. Estas do nun firme fiksite ke en 1984 la Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos inter la 13a kaj 20a de julio 1984 (la semajno antaŭ la Universala Kongreso en Vankuvero, Brita Kolombio, Kanado) en Swanwick, Derbyshire, Anglio.

Jam aperis kvarpaĝa "nula bulteno" kiu aperigas informojn pri la loko de la IJK, la datoj de la IJK kaj la temo "Homo kaj Maŝino".

Baldaŭ ankaŭ vi jam povos aliĝi. La Unua Bulteno kaj Aliĝilo aperos en aprilo kaj estos riceveblaj de: IJK, p.a. Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London, Anglio W11 4UF.

ƎE TEJO DEBRECEN 1983
1983
INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

# 39a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

23a — 30a julio 1983
DEBRECEN, HUNGARIO

| Kongresnumero |
|---|
| |
| UEA-kodo |

ADRESO DE LKK: H-1368 Budapest, Pf. 193, Hungario
Telefonoj: (+36/1) 141-078 aŭ (+36/1) 334-194.

ADRESO DE TEJO: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (+31/10) 361539.

**Por pagoj:**

**a.** El okcidentaj landoj:
Pagu al nederlanda poŝtĉekkonto n-ro 15722 12, menciu "39a Internacia Junulara Kongreso" kaj vian nomon,
aŭ al bankkonto ĉe AMRO Bank, Rotterdam n-ro 42.69.01444 en la nomo de "Universala Kongreso de Esperanto". Menciu "39a IJK" kaj vian nomon. Pagante per banko nepre aldonu la bankkostojn (6 gld.).

**b.** El socialismaj landoj: aliĝu ĉe via Landa Junulara Sekcio, kaj pagu al ĝi!

**c.** El Hungario: aliĝu ĉe LKK, petu enpagilon. Bankkonto: OTP VIII. ker 516-10005.

**d.** El Rumanio: kontaktu LKK-n

**************************************************************************

Mi aliĝas al la 39a IJK (de 23a ĝis 30a de julio 1983) laŭ kondiĉoj kaj prezoj presitaj sur la dorsa flanko:

Viro/Virino*

Profesio/fako/interesiĝo: (nedevige por aperigo en la kongresa libro): ______

Nomo (familia aŭ ĉefa, por alfabeta ordigo): ______

Kompleta nomo: ______

Kompleta poŝta adreso, (nacilingve en latinaj literoj, kun poŝta kodo ĝuste lokita): ______, ______

Lando (en Esperanto): ______

Naskiĝdato: ______

Mi volas lui biciklon: jes/ne* Vegetarano: jes/ne*

Dato de alveno: ______ Dato de foriro: ______

Dato de aliĝo: ______ Dato de pago: ______

Pagmaniero: ______ Subskribo: ______

* signifas: forstreku la nevalidan.

**NE SKRIBU ĈI TIE (por administrado)**

| TEJO-Membreco pagita | Pago ricevita | Konfirmilo sendita | 2a bulteno sendita | Ankoraŭ pagenda |
|---|---|---|---|---|
| | | | | |

Kongreskotizoj, laŭ la dato de la *pago*, en nederlandaj guldenoj kaj hungaraj forintoj:

| Aĝo de la kongresano je pagdato | Ĝis 31.3.1983 | | Ĝis 10.6.1983 | | Surloke | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| | gld. | Ft | gld. | Ft | gld. | Ft |
| ĝis inkl. 21 jaroj | 210 | 2520 | 250 | 3000 | 290 | 3480 |
| 22-26 jaroj | 235 | 2820 | 280 | 3360 | 330 | 3960 |
| 27-33 jaroj | 275 | 3300 | 330 | 3960 | 380 | 4560 |
| 34 jaroj aŭ pli | 310 | 3720 | 360 | 4320 | 410 | 4920 |

Kiuj pli frue aliĝas, ricevos la pli bonkvalitajn tranoktejojn.

[] Mi pagas laŭ la ĉi supra tabelo: + ________

[] Mi estas malpli ol 26-jara individua membro de UEA-TEJO kaj rajtas rabaton de 30 gld./360 Ft: — ________

[] Mi loĝos kaj manĝos en hotelo (2-litaj ĉambroj), tial mi krompagas 70 gld./840 Ft: + ________

Mi volas loĝi kun: ________

[] Mi volas partopreni nur la programojn, tial mi rajtas rabaton de 150 gld./1800 Ft: — ________

[] Mi estas malpli ol 26-jara kaj mi aliĝas al Budapeŝta UK favorpreze de 42 gld./500 Ft.: + ________
Mi sendis aliĝilon de UK/Mi petas aliĝilon de UK*

[] Mi volas subteni la partoprenon de gejunuloj de la tria mondo per aparta kontribuo: + ________

**Mi pagas sume:** ________

[] Mi aĝas pli ol 34 jaroj kaj devas do esti patrono de TEJO.
(Dato de pago: ________), aŭ pagos plej laste la unuan tagon de la kongreso.

[] Mi volas prezenti programon dum la Internacia Vespero kiel solisto/en grupo*.
(Bonvolu iomete priskribi): ________

________

[] Aliaj rimarkoj: ________

________

* forstreku la nevalidan!

La plena kongreskotizo rajtigas loĝadon manĝadon, ekskurson kaj partoprenon en ĉiuj kongresaj aranĝoj. Por la limdato de la aliĝilo validas la dato de la ricevo de la pago. Kongreskotizoj estas neniel repageblaj. En kazo de transpagaj obstakloj konsultu la Landan Sekcion de TEJO, aŭ la landan kotiz-peranton de UEA, aŭ LKK. Nur la kompleta kotizpago plene legitimas la aliĝon. Pagante por alia persono indiku klare la celon de la pago kaj skribu detalan adreson de la persono, por kiu vi pagas.

## Pasporta Servo de TEJO

En la aŭtuno de la pasinta jaro la gvidado de la Komisiono pri Pasporta Servo de TEJO ŝanĝiĝis de Jeanne-Marie Cash, kiu dum multaj jaroj laboris - kaj pro tio meritas nian elkoran dankon - gvidante la Pasportan Servon de TEJO, al Anne Amblès (51 rue Blanche, F-75009 Paris, Francio).

Ekde 1983 la Pasporta Servo mem alprenas novan organizan formon. Nun je internacia nivelo administras la Servon kaj ankaŭ kompilas kaj presas la liston Hamburga Administra & Presa Servo de Germana Esperanto-Junularo (HAPS) (Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1, FR Germanio). Je nacia nivelo nun respondecas pri la varbado de novaj membroj kaj gastigantoj la landaj sekcioj de TEJO (kaj la landaj kunlaborantoj en la landoj kie TEJO ankoraŭ ne havas sekcion). Je loka nivelo povas es esti aŭ individuaj gastigantoj aŭ perantoj kiuj peras gastaddezirojn al gastigemuloj de sia loko.

La listo por 1983 aperos ankoraŭ dum marto 1983 kaj estas mendebla aŭ ĉe HAPS aŭ ĉe via landa sekcio (aŭ landa kunlaboranto de la PS). Ĉu vi jam mendis la vian?

Ho jes - neforgesinde mencii estas ke ĉi-jare la prezo de la listo/membreco estas nur triono de la pasintjara prezo! Ĉu tio ne estas preskaŭ en si mem kialo aĉeti? Ĝi kostas 5 germanajn markojn aŭ kvin Internaciajn Respondkuponojn - lastakaze inkluzive de sendokostoj. Mendu ĉe HAPS!

adreso: Pasporta Servo ĉe HAPS
Germana Esperanto-Junularo
Postfach 10 14 22

D-2000 Hamburg 1 (F.R.Germanio)




## Al korespondemuloj!

En multaj nacilingvaj revuoj aperas rubriko de "korespondi deziras", kiuj akceptas ankaŭ alilingvajn korespondpetojn, multaj eĉ senpage. En Hungario eldoniĝis hungarlingva Internacia Junulara Revuo Világ Ifjúsága (= tutmonda junularo), kiu jam delonge aperigas ankaŭ Esperantlingvajn korespondpetojn senpage. Hungara Esperanto Junularo (HEJ) regule sendas al ĝi adresojn venantajn rekte al HEJ kaj el Esperantaj revuoj. Nun mi havas du proponojn por vi;

propono 1: sendu adresojn de korespondemuloj ankaŭ rekte al Világ Ifjúsága (Dohány u. 40, H-1975 Budapest, Hungario). Skribu Esperante aŭ nacilingve kaj nepre indiku en kiu lingvo vi volas korespondi.

propono 2: klopodu fari la samon en via lando. Alfrontu junularajn revuojn internaci-temajn kaj liveru al ili regule adresojn al Esperanto-revuoj.

Ne forgesu: tio estas same ( se ne pli) utila agado ol aperigi artikolojn pri la uzebleco de Esperanto!

Sándor Hideg, Hungario

## Argentino

Bona ideo! Pro la fakto ke multaj junaj esperantistoj en Argentino ne havas eblecon viziti kolektojn (bibliotekojn) de Esperantaj libroj nek la multan monon necesan por mem aĉeti multajn Esperantajn librojn, estis establita CIRBLIOTEKO (CIRkulanta biBLIOTEKO de ArgentEJO). Membroj de ArgentEJO rajtas senpage pruntepreni la librojn de la CIRBLIOTEKO, kiu konstante kreskas per donacoj de amikoj de ArgentEJO.

Malbona novaĵo por gejunulaj financoj estas ke membroj de ArgentEJO, kiuj ĝis nun senpage ricevis informilojn kaj servojn, nun ekde la komenco de 1983 devas pagi kotizon! Ni esperas ke per tio ArgentEJO povos daŭrigi sian bonan agadon kun pli da financa sekureco.

## Kanado

Junularo Esperantista Kanada (landa sekcio de TEJO en Kanado) havas novan adreson kiu estas:

p.a. N. Fleury
4630 Barclay n-ro 9
Montréal
P. Québec
Kanado H3W 1C7.

Sed atentu! La adreso ŝanĝiĝos denove en julio - informo tiurilate aperos en la julia/aŭgusta numero de tiu ĉi revuo (n-ro 4).

## Svislando

La 8an de januaro 1983 en La Chaux-de-Fonds fondiĝis Junularo Esperantista Svislanda (JES). Jam ĝi havas kvin lokajn kontaktadresojn en Basel, Bern, Genève, Luzern kaj Zürich kaj ĉefadreson je: Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando, telefono (039) 26 74 07.

## Ameriko

Post multjaraj klopodoj fine de marto 1983 aperos unuafoje tutamerika (junulara) Esperanto-revuo. La revuo, kiu nomiĝos Amerikonaŭto kaj ampleksos 20 paĝojn estas produkto de intensa interŝanĝo de ideoj - tiu interŝanĝo daŭras - inter Junularo Esperantista Kanada (JEK), Junulara Sekcio de Venezuela Esperanto-Asocio (VEA), Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) kaj Argentina Esperantista Junulara Organizo (ArgentEJO). Amerikonaŭto estos kompostita kaj presita en Brazilo dum ĉiuj el la partneraj landoj distribuos la revuon interne de sia lando kaj sendas artikolojn al la ĉefredaktoro, kiu estas: Luiz Alberto de Oliveira Coelho, Rua Moreira César 220, BR-25850 Paraíba do Sul (RJ), Brazilo.

## Kalendaro

MARTO

18 - 20: Internacia Junulara Karnavalsemajnfino; en Ber-le-Duc (F). Kosto (por nefrancoj:) FF 60. Informo: Lidja Bloch, 11 rue des Ducs de Bar, F-55000 Bar-le-Duc, Francio

APRILO

1 - 4: Internacia Junulara Festivalo en Domaso ĉe la Lago di Como. Informo: Itala Esperanto-Junularo, c.p. 210, I-56100 Pisa.

1 - 4: Sepa HEJS-tendaro; en Esperanto-Oazo, Gandía, Valencia (E). Kosto (por nehispanoj:) 500 pesetoj. Informo: Hispana Esperanto-Junularo, Atocha 98, 4°, Madrid 12, Hispanio.

2 - 4: Junulara Esperanto-Renkonto; en Kaposvár (H). Informo: Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 193, H-1368 Budapest. Kosto: Ft 400. Temo: Esperanto-vivo en la junularaj kluboj.

3 - 9: Internacia Renkonto de Infanoj; en Esperanto-Kastelo Grésillon(F) Informo: Esperanto-Domo, Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé, Francio.

4 - 9: Seminario de TEJO kaj PSEK; en Pomiechówek, Warszawa (PL). Temo: organizado de renkontiĝoj. Kosto: 80 - 100 gld. Informo: Pola Studenta Esperanto-KOmitato, ul. Fredry 6, Poznań, Pollando. Aliĝilo aperis en 'koncize' n-ro 1/83.

10 - 14: Studenta Interlingvistika Seminario; en Pomiechówek, Pollando. Informo: PSEK, ul. Fredry 6, Poznań, Pollando.

22 - 24: Pajleja Semaujnfino; en Neustadtgödens (D). Kosto: 22 DM. Informo W. Hinrichs, Staustr. 14, D-2945 Neustadtgödens, F.R. Germanio.

24 - 1(maj) Seminario de KER de TEJO; en Strasbourg (F). Temo: Partopreno en amaskomunikado. Kosto: 150 FF (sed la Eúropa Junulara Centro, en kiu okazos la seminario, donos vojaĝsubvenciojn al partoprenantoj). Informo: TEJO (Strasburga seminario), Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

30 - 2(maj) Unuamaja Renkontiĝo de Esperanto-Junularo; en Brĉko, Bosnio-Hercegovino (YU). Informo: Esperanto-Junularo de Bosnio-Hercegovino, Vaŝe Pelagica 8/I, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio.

M A J O

12 - 15: Kongreso de SEJU kaj SEF; en Gävla. Informo: Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, Brunnsgatan 21, S-111 38 Stockholm, Svedio.

12 - 15: Ĉielira Renkontiĝo; en Ruinen (NL). Temo: trafiko. Kosto: 65 - 100 gld. (Laŭ aĝo kaj aliĝdato). Informo: Nederlanda Esperanto-Junularo, t.a.v. Mariken Creuwels, Balijelaan 16, 3521 GR Utrecht, Nederlando.

20 - 23: Germana Esperanto-Kongreso (kun paralela porjunulara aranĝaĵo); en Bad Säckingen (D). Informo: Germana Esperanto-Junularo, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1, F.R. Germanio.

20 - 27: Renkontiĝo de Juneco; en Vinkovci (YU). Informo: Ź. Pehar, Opatijska 41, YU-54000 Osijek, Jugoslavio.

J U N I O

10 - 12: Internacia Somernokta Festo; en Hollager Mühle (apud Osnabrück) (D). Kosto: DM 10 - 50 (laŭ aliĝdato kaj komfortdeziro). Informoj: Ursula Felhölter, Töpferstr. 20, D-4500 Osnabrück, F. R. Germanio.

## TEJO Tutmonde!

aperas 6 fojojn jare por ĉiuj Individuaj Membroj de TEJO, Landaj Sekcioj kaj kontaktadresoj.

REDAKTAS: Paŭlo S. Hopkins, 111 - 157 University Ave. W ,
Waterloo, Ontario, KANADO N2L 3E5

ENPAĜIGAS, PRESAS. EKSPEDAS: Tobo & GEJ, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1